Li eklernis Esperanton en 1979 kaj en 1984 la ŝtata fabriko, kie li laboris, sendis lin oficiale lerni esperanton unu jaron en Pekino. Li fariĝis movadisto pri la lingvo en Centra Ĉinio kaj en 1993 li forlasis la fabrikon kaj per Esperanto entreprenis kursojn, libro-servon, vojaĝservon, turismon kaj internacian komercon.

Li estas prezidanto de la Xi'an-a Esperanto-Asocio

Li proponas diversajn temojn :

Ĉina kulturo : la ĉina deveno

Ĉina lingvo : komuna lingvo Mandarino kaj dialektoj

Ĉina historio : mia urbo Xi'an, aŭ Historio de Ĉinio

kun najbaraj landoj

Internacia komerco per Esperanto (lia profesia sperto)

Li ŝatas diskuti kun aŭskultantoj kaj bonvolas publike prelegi al neesperantistaro

Li prelegos en Rennes, St Malo, St Briec, Plouézec, Lannion, Douarnenez, Hennebont, Vannes, Couëron, Nantes, St Aignan-de-Grand-Lieue, St Nazaire (bonvolu legi la precizajn datojn en la ĉi-posta tabulo)

La Germano D-ro Rainer KURZ rondvojaĝos du semajnojn ekde la 13a de majo 2019



Li loĝas en [Stuttgart](#) kaj parte en [Sidnejo](#), [Aŭstralio](#).

Li studis en la [Universitato de Stuttgart](#) kaj doktoriĝis pri [telekomunikado](#) en Stuttgart kaj Kitakyushu/Japanio. Li laboris interalie por [McKinsey](#) kaj [Gemini Consulting](#). De 1999 li estras propran konsultan fir-

maon *Rainer Kurz Business Consulting*, kiu laboras por firmaoj en la telekomunikada fako kaj fondis kun kvar studentoj de la Universitato de Hohenheim **interretan merkatejon por rifuĝintoj kaj entreprenoj kiuj ŝatas dungi rifuĝintojn** kaj pro tio gajnis pretiĝan germanan premion. Li ankaŭ estas interreta entreprenisto. Inter alie, li kreis kaj licencigis interretajn merkatojn por liberaj profesiuloj laŭ la nomo de [Free-lance-Market](#) (<http://www.freelance-market.com>) en diversaj landoj ([Germanio](#), [Aŭstralio](#), [Ĉeĥio](#), [Ĉinio](#), [Novzelando](#))

De 1999 ĝis 2001 li estis prezidanto de [Germana Esperanto-Asocio](#) (GEA). [Nun](#) li estas estrarano de GEA (pri eksteraj rilatoj) kaj de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), vicprezidanto ĉe [FAME Fondaĵo](#), prezidanto ĉe Rainer-Kurz-Fondaĵo por la subteno de Esperanto.

Li proponas la TEMOJ :

- 1) La "laboro por rifuĝintoj"-
 - 2) La internacia filmkonkurso Esperanto 125 jaroj
 - 3) Stuttgart: Beleco, vivo kaj Esperanto agado.
 - 4) Intervjuo kun Nobelpremiito Reinhard Selten.
- Eblas pliaj temoj laŭ interkonsento.

Mi estas organizanta tiun turneon en Rennes, Pleudaniel, Douarnenez, Couëron, Nantes, St Nazaire ... Ne hezitu demandi la respondeculon de via klubo por koni la precizan daton kaj la temon de la prelego en via urbo/vilaĝo !

Josette Ducloyer

<u>Ville</u>	<u>Date arrivée (matin)</u>	<u>Date départ (matin)</u>	<u>Association d'accueil affiliée à la FEB</u>	<u>Responsable hébergement</u>	<u>Adresse</u>	<u>Tél</u>	<u>Adresse internet</u>
Montfort- Rennes	09/03	11/03	Esperanto-Rennes	Josette Ducloyer	7 r de la Fée Viviane 35160 Montfort-sur-Meu	02 99 09 71 92	jducloy@club-internet.fr
Pleugueneuc aux Montfort (gastigado)	11/03	12/03		Xavier Godivier (aŭ Josette Ducloyer)	Le Bas Couëdan 35720 Pleugueneuc	02 23 35 12 25 06 30 96 96 32	xgodivier@esperanto.org
St Malo	12/03	14/03	Groupe Esperanto de St Malo	Anne-Marie Argney	47 rue du Père Lebreton 35400 St Malo	02 99 40 24 86	amargney@wanadoo.fr
St Brieuc	14/03	17/03	Armor-Esperanto	Laurent Peuch Jerome-Murielle Caré	17,rue Léon Blum 22000 St Brieuc 25 rue Louis Blanc 22590 Pordic	02 96 78 29 70 02 96 79 39 32	ltpauch@hotmail.com murielle.care@me.com
Plouézec	17/03	19/03	Asso de Plouézec	Jeanne Pouhaër	Kerlou n°7 22470 Plouézec	02 96 20 68 07	jeanne.pouhaer@orange.fr
Lannion	19/03	21/03	Armor Esperanto	Jean-Claude Dubois Maja Mériaux	Lan Gily 22300 St Michel-en-Grève Koad mérien 22140 Bégard	02 96 35 73 06 02 96 45 30 60	marbordo@gmail.com meriaux.family@wanadoo.fr
Le Juch- Douarnenez	21/03	23/03 vespere	Groupe d'Esperanto de Douarnenez	Chantal Allen	Guerlach hir 29100 Le Juch	06 74 15 78 09	chantalallen9@gmail.com
Hennebont kaj Loudéac (AG FEB la 24an)	23/03 vespere	26/03	« Hennebont-Esperanto, section du Foyer Laïque »	Yvette Veslin	Kervach 56650 Inzinzac-Lochrist	02 97 36 08 75	yvette.veslin@orange.fr
Vannes	26/03	28/03	« Esperanto Vannes »	Elisabeth Le Dru	1, Allée de Calmont 56000 Vannes	02 97 63 97 65	ledruelisabeth@gmail.com
Couëron	28/03	31/03		Christiane Lamy-Roger Foucher	36 rue Jean Bart 44220 Couëron	02 40 86 01 08	christiane.lamy@cegetel.net
Nantes	31/03	02/04	CCNE	Gilles Picault / Béatrice Devais	10, Rue d'Espagne 44000 Nantes	06 24 35 02 49	gilp-ccne@outlook.com
St Aignan	02/04	04/04	Association d'esperanto de St Aignan	Solange Goan	17 route du Lac 44860 Saint-Aignan-de-Grand Lieu	02 40 31 02 56 06 81 18 30 12	sgoan@club-internet.fr
St Nazaire	04/04	06/04	Association d'esperanto de St Nazaire	Chantal Barret	38, rue de la Croix Fraïche 44600 St Nazaire	02 40 01 97 27	patchdomo@yahoo.fr

Okazis ...

LA VIZITO AL "LE PALACRET" kaj POSTE

Nia pikniko celis viziton al la tilad-muelilo¹ "Le Palacret" sur la rivero "Le Jaudy" ene de la komunumo St Laurent-Béguard. Dank'al François Le Moullec, lasta proprietulo, tiu tilad-muelilo estas la lasta en bonfunkcia stato en la regiono "Le Trégor". Fakte, post sia agado en 1983, li daŭre funkciigis la diversajn maŝinojn por konservi ilian bonstaton kaj tiel, transdoni al la vizitantoj, tiun heredaĵon.



Dum la vizitotago, griza vetero kaj eĉ pluveto akompanis nin ĝis la parkejo "Le Palacret", kie la gaja murmur-kanto de la rivero bonvenigis nin. Post la elfluejo, Yves, nia gvidanto, atendas nin kaj malkovras al ni, la diversajn etapojn de la linoplanto ĝis la linotolo.

La vizito ekas ĉe la kluzpordeto, kie Yves liberas la akvo-energion kaj baldaŭ, emocia momento, la fluo superŝutas la lignan padel-radon, kaj la muelil-koro denove batas... kuntirante, per sinsekvo de pulioj, de rimenoj kaj de dentaj radoj, la tutajn maŝinojn.

Yves klarigas al ni la funkciadon de la diversaj maŝinoj de la tilado ĝis la stupo-akiro. Tiu "moderna" tilado atestas pri la lasta epoko post la alveno de la hidraŭlika energio. Sed antaŭ la modernaj maŝinoj, la laboro estis plenumita per brak-maŝinoj. Pri tio atestas la diversaj instrumentoj konservataj surloke, en tiu muelilo-muzeo. Kaj Yves, iom nostalgia pri la iamaj gesto kaj laboro, pravas al ni la efikecon de tiuj malnovaj maŝinoj movataj de brak-forto.

Tie finiĝas la laboro de la tilad-muelilo. La sekvan-taj etapoj : la ŝpinado de la stupo-fibroj kaj poste la teksado estas faritaj aliloke, ĉefe en kelkaj urboj kiel Uzel aŭ St Thélo, kie estis teksataj la famaj toloj : "Les Bretagnes"

Tiu instru-promenado finiĝas per vizito al la dokumento-salono, kie ni povas vidi diversajn atestilojn pri tiu viv-epoko sur la "tregora" regiono.

Pro la malbela vetero, ni disponis pri bela salono, kie ni, kelkaj dudek personoj ĝoje kunmanĝis.

Post la manĝo, france prelegis Normand Fleury, kebeka ĝarden-arkitekto, pri la arbo-rolado ene de la medio. Tiu prelego, al la publiko malfermata, kunigis kelkajn kvindekajn personojn kaj estigis grandan sukceson.

Jeanne, Pluezek

1- tili : disfibrigi kanabajn aŭ linajn tigojn kaj forigi la senutilajn partojn.



Armor Esperanto

Armor esperanto proponis semajnfinan kurson en oktobro



Bela kaj agrabla aŭtuna kurso, je 4 niveloj, okazis dum du tagoj en Saint-Brieuc, **sabaton la 13an kaj dimanĉon la 14an de oktobro.**

30 esperantistoj el diversaj bretonaj urboj partoprenis. Plie, venis 2 komencintoj el Chateaubriant kaj eĉ paro el Perigordo !

Maryvonne Pennec malkovrigis la lingvon al komencantoj.

Murielle Caré ordigis konojn por komencintoj, kaj proponis etan saluton kun japana amikino per telefono.

Laurent Peuch laborigis progresantojn interalie pri korekta prononcado.

Elinjo Le Dru akceptis siajn lernantojn en la traserberia trajno dum vivkadra simulado.

Sabaton, Amapola Triguero kaj Laurent Peuch prezentis sian vojaĝon en Ĉinio. Tiun vojaĝon kun nepoj kaj filino de Laurent bele ĉiĉeronis Sanoza.

Ili malkovris regionojn inter la blua kaj la flava riveregoj, en la ĉirkaŭaĵo de Nanchang.

Ili montris fotojn pri lernejoj, pri kutimoj kaj vindindaĵoj. Ni ankaŭ ricevis plezure novaĵojn de Matensuno, agrabla knabino kiu jam partoprenis Pluezekan semajnon.

Armor esperanto aparte gratulas Elinjo-n,

kiu ricevis diplomon pri esperanta instruado en ILEI konferenco en Madrido fine de Julio 2018, dank'al unujara kaj fruktodona laboro kun Katalin Kovats (edukado.net) Gratulon al Elinjo !



A.R.T. comiteo

Murielle Caré

Informo de ArmorEsperanto : la Pluezekaj Renkontoj ne okazos en 2019 pro la renovigo de la konstruaĵo « salle des fêtes » kiu ne estos finita antaŭ la somero 2019.

Pro tio, la asocio ne dungos junulon por civila servo nun.

Vojaĝo al Ĉinio de niaj klubanoj

Kial ni planis vojaĝon al Ĉinio ?

En 2015, dum la ILEI Konferenco en Ostende, ni konatiĝis kun Sanoza, ĉina esperantistino, kaj Matensuno ŝia nepino. Matensuno estis tiam 7 jaraĝa, samkiel mia nepino Petra. Do, ni proponis interrilaton inter la du filinoj, des pli, ke ili similas pri personecoj. Sanoza kaj Matensuno tuj konsentis. Do la sekvantan someron, en 2016, ni invitis ilin en Bretonio dum du semajnoj, unu ĉe ni kaj alia kadre de la Pluezekaj Renkontiĝoj. Dum tiu restado kreiĝis vera amikeco inter la infanoj (Matensuno kaj Petra sed ankaŭ Nathan, mia nepo samaĝa kiel la knabinoj), kaj ankaŭ inter Sanoza kaj ni. Tuj post la restado en Bretonio, Sanoza invitis nin al Ĉinio. Pro la tro forta varmo en Ĉinio dum la somero (ĉirkaŭ 40 gradoj !) ni rezignis vojaĝi al Ĉinio kaj partopreni en la UK en Seoulo en 2017.

Finfine, ni planis la vojaĝon en majo 2018, dum la printempaj lernoferioj. Kompreneble tiu projekto instigis miajn genepojn plu lerni E-on, aparte dum la pluezekaj renkontiĝoj en 2015, 2016 kaj 2017.


Dum la vojaĝo ili spertis per si mem kiel Esperanto malfermas pordojn kaj korojn de eksterlandaj amikoj. Ni foriris kvinope je la fino de aprilo por iom malkovri Ĉinion.



Ni ne volis viziti tro grandajn urbojn kiel Pekino aŭ Ŝangajo, pro tio ni alteriĝis en Xi'an, « meza » urbo kun pli ol 6 milionoj da loĝantoj. Dum la busveturado de la flughaveno al la urbocentro, ni ege miris pri la multnombraj novaj kvartaloj konsistitaj el altaj similaj domegoj 30 etaĝaj.

Atinginte la centron de Xi'an ni malkovris la pli tradiciajn kvartalojn kaj la imponajn muregojn de la malnova urbo.

Ni bonŝance loĝis en gastejo konsistanta je pluraj kortoj ĉirkaŭigitaj de tradiciaj dometoj. La bieno formas apartan kvartalon ĉirkaŭigitan de muroj. Tiel estis la antikva urbanizado en Ĉinio.



Ĉinaj urboj kreskas .

En nunaj urboj la ĉinoj loĝas ĉefe en domegoj. La plej oftaj konstruitaj antaŭ 20 aŭ 30 jaroj, havas sep etaĝojn (sen lifto...). Hodiaŭ oni renovigas ilin kaj aldonas eksteran lifton. La nunaj domegoj havas plejofte 30 etaĝojn kun liftoj kompreneble. Oni povas vidi plurajn novajn kvartalojn kun dekoj da tiaj altaj

konstruaĵoj en kaj proksime de la urboj. Ni tiam konscias ke la loĝantaro rapide pli-altiĝas en ĉiuj urboj kiujn ni vizitis.

Surstrate

Antaŭ la vojaĝo, ni iom timis suferi pro la poluado en la urboj.

Certe, en la urboj kie ni restadis (Xi'an, Nanchang ĉirkaŭ 5 milionoj da loĝantoj, Wuhan ĉirkaŭ 12 milionoj da loĝantoj) ni vidis amasojn da homoj kaj da veturiloj. Sed, fakte ni ne suferis pro poluado ĉar multaj veturiloj, ĉefe la multnombraj motorbikloj, funkcias per elektroenergio, ne per benzino, plie la ŝtataj kaj lokaj registaroj kreas multajn publikajn parkojn kun aleoj por biciklantoj kaj piedirantoj, ĉefe laŭlonge de la riveroj kaj lagoj kiuj troviĝas ene de la urboj. Tial, eblas longtempe promenadi en tiuj urboj en kvieta kaj agrabla etoso ĉefe dum vespero. Krome, la registaro plantigas multajn arbojn laŭlonge de la stratoj sur la trotuarojn por iom mildigi la varmon.

Ĉu la stratoj estas bruaj en la urboj? Certe jes, sed ne tiom rilate al la multnombraj ĉiujspecaj veturiloj. Certe, multaj veturiloj funkcias per elektra energio, tamen, la stiristoj ofte hupas por averti, ke ili alproksimiĝas... kaj volas preterpasi.

Kiam oni promenadas, necesas esti ege atentema por trairi la stratojn : en Ĉinio, la veturiloj ofte ne respektas la prioritaton de la piedirantoj, eĉ sur la piedirpasejoj. Kaj inter la veturiloj, ŝajnas ke la prioritato estas por la plej granda kaj impona.

Vojaĝo al Ĉinio de niaj klubanoj (sekvo)

Kiam ni piediras tra la stratoj, ni konstatas, ke la ŝoseoj kaj trotuaroj estas tre puraj (pli puraj ol en Francio !). Ĉu la preterpasantoj uzas diligente la rubujojn? Ne vere: fakte, en ĉiu strato videblas virino aŭ viro (ofte emeritaj) kiu balaas per diversaj balailoj dum la tuta tago, de frumatene ĝis malfrue vespere. Tial, multaj homoj trovas laboron kvankam malbone pagitan.

Belaj surtrotuaraj strekaĵoj por kiu ?

Sur trotuaroj, troviĝas strekaĵoj por la blankaj gvidbastonoj de blinduloj. Sed, ni neniam vidis homojn kun tiaj gvidbastonoj... krom mi. Ŝajnas eĉ, ke mi surprizigis la preterpasantojn kiuj ne kutimas vidi tiajn bastonojn.

Alia ofta vidindaĵo : virino aŭ viro kiu faras gimnastikajn moviĝojn por plibonigi kaj lertigi sian korpon. Kaj vespere, oni povas ofte vidi homojn, ĉefe virinojn, kiuj individue aŭ kolektive, gimnastikadas aŭ dancadas.

Dum la tago, sub la ombro de arboj aŭ de pontoj, ankaŭ videblas viroj ludante per kartoj aŭ damtabuloludoj.

Iam, pere de Sanoza, mi petis foti du virojn kiuj ludis tiel, sed ili rifuzis. Laŭ nia amikino, ili verŝajne ludis monon : tio estas malpermesita.

En la ĉinaj stratoj, ne bezonas benkoj : la homoj, ĉefe la junuloj, sidiĝas kaŭre por sin ripozi, atendi la aŭtobuson ktp, ofte rigardante sian poŝtefonaĵon. Eble, ni kapablus fari tion, sed la problemo estus por stariĝi...

La ĉiama uzado de la poŝtelefono.

La ĉinoj, eĉ maljunuloj, multe uzas sian poŝtelefono : ekzemple ili pagas preskaŭ ĉion per skano de QR-kodo. Eĉ, foje ni vidis preterpasantojn donante monon al muzikalmozpetanto per siaj poŝtelefonoj !

Nia amikino Sanoza, kiu estas samaĝa kiel ni (t.e. pli ol 65 jaroj...), ankaŭ uzas sperte sian poŝtelefono por aĉeti flug/trajnbiletojn, mendi varojn, sendi pakaĵon ktp. Ŝi ne plu uzas komputilon ; poŝtelefono necesas kaj sufiĉas por multaj klopodoj.

En la lernejoj.

Preparinte la vojaĝon, ni demandis al Sanoza ĉu eblos pasigi duontagon en lernejo.

Do, en Nanchang, ni vizitis lernejon kies estro estas amiko de Ping, la edzo de Sanoza. Tie ni ĉeestis kurson pri la angla lingvo.

Kaj poste, dum la « 6a Ĉinasimpozio pri E-instruado en mez-bazaj lernejoj » en Chenzou en kiu ni partoprenis, ni vizitis aliajn lernejojn kie oni instruas E-on. Pri tiu simpozio, ni verkos alian artikolon.

Kio karakterizas la lernejojn kiujn ni vizitis ?

Averaĝe 50 ĝis 60 lernantoj partoprenas la kurson sam-

tempe. Pro tio, la instruistoj uzas mikrofonon kaj ankaŭ modernan videoekranon. Ili ofte ripetigas la infanojn laŭvoĉe, eĉ tre laŭte ; tiam ni komprenis kial la ĉinoj havas fortan voĉon kiun ili ofte uzas en la stratoj, trajnoj, restoracioj ktp.



Ni miris vidante, ekde la fino de la angla-kurso en la Nanchang-lernejo, la lernantojn preni siajn bovlojn el la skribotabloj kaj virinon kunporti grandan marmiton : la infanoj iris al la marmito, plenigis sian bovlon kaj manĝis ĉe sia skribotablo ; en multaj lernejoj, la klasoĉambro ankaŭ estas la manĝoĉambro.

Multaj lernejoj, aparte en la novaj kvartaloj, estas privataj ; tio signifas, ke la gepatroj devas pagi la instruadon de siaj infanoj. Sed ankaŭ en la publikaj lernejoj, la gepatroj devas doni monon.

En tiu lernejo ni spektis modernan hiphopan dancadon de tre talenta okjara knabo.

Dank'al la interpretado de Sanoza, ni babilis kun kelkaj instruistinoj : tiel ĉiu povis fari demandojn. La instruistinoj demandis al ni : « Ĉu vere en Francio, eblas havi tiom da infanoj kiom vi deziras? » Plurfoje ni sentis la gravecon de la limo pri la nombro de infanoj. Fakte dum dekoj da jaroj (t.e. 2 generacioj) familioj rajtis havi nur unu infano. Tio havas gravajn konsekvencojn por la infanoj mem. Ekzemple : Matensuno havas nek gefratojn nek gekuzojn. Ŝiaj familianoj estas nur la gepatroj kaj geavoj. Ŝi interkonatiĝas kun aliaj infanoj nur en lernejo.

En alia artikolo ni verkos pri niaj renkontiĝoj kun la ĉinaj esperantistoj en Xi'an, kie ni konatiĝis kun Ĉielismo, en Nanchang, Chenzhou (kie ni partoprenis en la «6a Ĉina simpozio pri E-instruado en mez-bazaj lernejoj» kaj Wuhan (kie ni revidis Trigo-n kiu partoprenis plurfoje en la pluezekaj renkontiĝoj. Ni kompreneble ankaŭ prezentos la plej interesajn vidindaĵojn kiujn ni ŝatis.

Amapola kaj Lorento

Universala kongreso 2018

LISBONA KONGRESO 28 julio – 4 aŭgusto 2018

La kongreso okazis en Universitato de Lisbono. Kelkaj el nia bretona grupo luprenis loĝejon 15 minutojn piede de la Universitato : Jannick, Maja, Hubert kaj Marie-Pierre, ĉiuj kantistoj en la koruso Interkant’.

Kiel kutime dum la kongresoj, Maja plejmulte interesiĝis pri la kulturaj aranĝoj : estis invitataj altvaloraj kantistoj el Nederlando, Italio, Rusio kaj Serbio, Francio, Zairio, ktp. Ankaŭ rolis fado-kantistoj kaj tradiciaj dancistoj dum la nacia vespero. Ni eĉ malkovris elektronikan muzikon el Koreo.



Hubert kaj Maja partoprenis en du interesaj ekskursoj : unue, vizito de Lisbono. Ili jam konis la urbon, sed feliĉe la rondiro kondukis ilin al ne konataj lokoj. Ekzemple, la Muzeo de Azuleĥoj, kie ili eksciis pri historio de tiu arto. Ankaŭ la Muzeo de Kaleŝoj estis sufiĉe rimarkinda.

La dua ekskurso denove rilatis al azuleĥoj, kaj tiufoje, ili mem pentris siajn proprajn kahelojn ! Hubert, Maja kaj Jannick unue vizitis la azuleĥo-fabrikon, kie ili havis la okazon sekvi ĝian manproduktadon, kaj poste, ili pentris dum duon-horo. Vidu la rezulton ĉi flanke

Universala kongreso 2018



Por fini la tagon, en Setubal, ni gustumis lokajn vinojn ĉe vinfabrikanto de « muskatel ».

Dum la tuta semajno okazis pluraj kantprovludoj, ĉar ni devis prepari nin por la internacia vespero. Du korusoj funkciis paralele, kaj kelkaj el ni aliĝis en la du. Nia ĥorestrino estis Zdravka Boytcheva, kiu estras ekde 2014 la koruson Interkant', kaj ekde 2018 la internacian koruson.

Deko da kantistoj el Interkant' speciale vojaĝis al Lisbono por prezenti kelkajn kantojn el sia repertuaro. Kun la internacia koruso (40 kantistoj), ni plie preparis tri novajn kantojn.

Kiel kutime dum la kongresoj, Jannick partoprenis krom la korusprovludojn kaj koncertojn, diversajn programerojn de la UEA enhavo por prezenti mem ion aŭ aŭskulti kaj diskuti ĉe prelegoj interesaj kiel « Erasmus+ malkovru eblojn financi vian agadon » aŭ « moderna edukado kaj la nuna mondo- ĉu tempo por ŝanĝo de paradigmoj ? » kaj Komitata forumo pri Kapablo/ Komunumo kaj « Eŭropademografia kaj ekonomika dinamiko : migrantoj necesas ». Sed la plej granda plezuro estas la babilado kun malnovaj kaj novaj geamikoj tra la mondo.

La koruso Interkant' provludas dufoje ĉiujare en Greziljono, printempe kaj aŭtune, dum 4 tagoj ĉiujfoje. Ni ofte prezentas spektaklojn, precipe kun aliaj korusoj el la regiono de Baugé.

Niaj kantoj devenas el la tuta mondo, tradukitaj en Esperanto. Ĉiuj novaj kantistoj estos varme akceptitaj.



Maja kaj Jannick

Klubo de Guingamp

GABY RETROIRAS

La 23an de septembro, partoprenis Gaby en SEL-renkonto kun geamikoj.

Ŝi marŝis per sia helpmarŝilo, sed du motorciklaj retrospeguloj, aliflanke de la helpmarŝilo, mirigis min...

La geamikoj rideksplodis: «oni tuj klarigos al vi, Anne!»... Kiam Gaby iras al la manĝoĉambro de sia maljunulejo per sia helpmarŝilo, ŝi rapide laciĝas (98-jara estas Gaby). Do, ŝi sidiĝis sur la benkon de la helpmarŝilo kaj daŭrigis sian iron malantaŭen, movigante la radojn per siaj piedoj sur la planko, sed ...ŝi ne vidas malantaŭe!

Ideo lumigis Dimitri-on (iun de ŝiaj nunaj lernantoj pri Esperanto). Li instalas la du retrospegulojn. Nun Gaby povas vidi malantaŭe, kiam ŝi retroiras!

Foto de Nikol: Dimitri staras ĉe Gaby. Anne



VOJAĜO TRA LA TEMPO

Dum ferioj mi revizitis la lernejon, partoprenante kun Loris, Calliopée, Olivia, kaj Sylvie la alia avino, en «tago de la lernanteto je 1930», en Bothoa.

Je la deka, kun aliaj personoj, proksime dekkvin, ni piediris per kava vojeto, kiu kondukis nin ĝis la lernejo. Multe da koto malpurigis niajn ŝuojn, kaj mi pensis al infanoj kiuj havis tramalsekigajn piedojn en pajlo de siaj lignoŝuoj.

Tri kilometrojn poste ni atingis la lernejon, kie instruisto atendis nin en sia griza kitelo. Ni vicis duope en la ludhalo, eniris klason kie ni sidiĝis ĉe malnovaj lignotabloj.

Post kelkaj klarigoj pri disvolviĝo de la tago, la instruisto prezentis moralan lecionon; la temo estis «oni ne plu kredas mensogulon, ĉe kiam li diras veron». Poste ni faris diktaĵon, dum la infanoj faris alian laboron. Ni devis skribi per plumo kompreneble, kaj mi makulis miajn fingrojn per violkolora inko! La diktaĵo estis teksto de Guy de Maupassant, mi faris kvar eraĵojn, la instruisto donis al tiuj kiuj eraris malpli ol kvinfoje unu bonfaran markon! Mi estis kontenta!

Je la dektria horo, ni iris kune ĝis la kafejo de la vilaĝo Bothoa, por manĝi pansupon kun kelkaj legomoj, kaj buterpanon kiel deserto.

Poste ni reiris lernejon, kaj vizitis domon de la unua instruistino, kun belaj epokaj mebloj kompreneble.

Kaj dum la infanoj ludis en la korto per bicikladoj kaj faris fajfilojn, ni vizitis muzeon, kaj arkivojn kie multege da objektoj (kartoj, inksorbiloj, libroj, kajeroj, plumujoj, kiteloj, ŝuoj, lignoŝuoj...) estas bonege klasifikitaj kaj kelkfoje utiligitaj por filmoj.

Finfine ni vidis filmeton pri klaso en tiu lernejo dum la jaroj sesdekaj.

Ni pasis tre agrablan tagon kiu plonĝis nin en pasintan tempon.

Martine, dum majo 2018. Klubo de Guingamp



Foto: Nijole, el Litovio, ĵus ricevis en turismoficejo de Guingamp, gvidbroŝuron esperante skribitan de la Guingamp-klubanoj: «Rondiro por malkovri malnovan Guingamp-n».

KIOMDA, la konektita kalkulilo

La aktiva bretona esperantisto Jean-Claude Dubois estas ankaŭ altnivela inĝeniero, kiu kunkreis sian firmaon pri kalkuliloj.

Li ĵus kreis novan kalkulilon, kies nomo estas en Esperanto: KIOMDA. Tiu kaptilo povas tre facile kalkuli la nombron da partoprenantoj en festoj kaj manifestacioj.

Por senpagaj festoj estas malfacile koni la nombron da partoprenantoj sed tiu kono povas esti ege utila por komuniki pri graveco de la evento, antaŭvidi sekurecon, peti subvenciojn ktp.

KIOMDA estas eta ilo simpla, fidinda kaj malmultekosta. La kliento luprenas ĝin tage, ĝin ricevas per poŝto kun manlibro, ĝin instalas mem en la enirejo de la evento per kelkaj ŝraŭboj, elŝutas la aplikadon por akceli en reala tempo al la datumbazo ekde sia komputofono (*smartphone*). Tiel ĉiumomente li scias kiom da personoj partoprenas en la festo aŭ manifestacio.

En la ĵurnalo Ouest-France aperis artikolo kun foto pri tiu kreado la 3an de oktobro 2018.

JC Dubois anoncas rabaton da 75% en 2018 al ĉiu esperantisto, kiu petos uzon de KIOMDA per Esperanto !Kontakto sur la retejo kiomda.fr

Josette Ducloyer

Klubo de Rhuys

Inter la 21-a kaj 23-a de aprilo, agrabla litovanino kaj sperta esperantistino **Nijole Stakeniene**, vizitis la klubon de Rhuys

La 21an, tagmeze, mi rendevuis ĉe Marite sekretariino de la klubo de Vannes, en Damgan, kie mi ekkonis Nijole. Ŝi estas simpatia kaj afabla virino kiu sperte parolas la Esperantan lingvon. Ni agrable kunmanĝis ĉe Marite kun ŝia edzo Johano, Ewa kaj Denezza du aliaj esperantistinoj el la klubo de Vannes. Poste mi veturigis Nijole en Sarzeau kie la geedzoj Clopeau akceptis nin en la kulturcentro. Mi hejmeniris kun Nijole kaj vespere ni kunmanĝis ĉe Hélène. kaj ŝia edzo kiuj bonvole akceptis la klubon en sia domo. Mi aldonas ke du aliaj esperantistoj, la geedzoj Champeau ankaŭ ĉestis. Ni trapasis agrablan vesperon kaj ĝuis bonan manĝaĵon preparitan de la membroj de la klubo.

La 22an mi veturigis Nijole al la kastelo de Suscinio kaj ni kun la geedzoj Champeau kune vizitis la kastelon. Sekvis la vizito de la abatejo de Sankta Gildas de Rhuys kie Geori, nia honorprezidanto, bone klarigis al Nijole la historion de Heloise kaj Abélard, famaj francaj malfeliĉaj verkistoj.



De tie ni iris kune ĝis Arzon, kie ni denove kunmanĝis en krespejo fronte de la maro. Post la tagmanĝo, ni dispartigis kaj mi daŭre vizitigis la duoninsulon el Rhuys al Nijole antaŭ ol ni rehejmeniris.

Fine, la 23-an mi veturis Nijole antaŭ la preĝejo de Missillac kie ni rendevuis kun Sinjorino Lamy kaj Sinjoro Foucher kiuj gastigis Nijole dum la sekvantan tagon...

Francis

Someraj agadoj de la klubo de Rhuys

Ĉi tiun someron 2018, nia klubo denove proponis du tagojn "Eltrovo de Esperanto en la Morbihana Golfo".



La unua tago okazis la 22an de julio kun 7 partoprenantoj. Post rapida prezento de la internacia lingvo "Esperanto", de ĝia kreanto kiu estas doktoro LL Zamenhof, la ŝipo eliris el haveneto Le Lojo je la 14an 40 tuj norden. Kiel kutime la ŝipo cirkaŭiris la insulon de la monakoj sed dum dua parto de tiu navigado okazis io neatendita: tra la radio VHF aŭdiĝis alvoko fare de CROSS ETEL por helpado de ŝipeto kiu paneis norden de la insulo "Creizig". Do, ni devojiĝis ĝis tiu loko sed kiam ni alproksimiĝis de tiu ŝipeto, ĝia respondeculo diris ke li jam atendis alian ŝipeton! Do ni faris tiun devojon tute vane... Tamen niaj partoprenantoj ĝuis la neatenditan eventeton.

La dua tago okazis la 7an de aŭgusto kun ankaŭ 7 volontuloj el kiuj 3 estis jam konvinkitaj esperantistoj el la klubo de Vannes! Do mi iom transdonis miajn klarigojn pri "Esperanto" al Ewa kiu bone elturniĝis dum la tuta vojaĝo kiam mi nur zorgis pri la stirado de la ŝipo. Fine de la posttagmezo, ni alboridiĝis al la kajo de Le Lojo kiel antaŭvidite.

Konkludo: tiuj du momentoj estis bone apreziitaj de la vojaĝantoj sed eble pli dank'al la promenado ene de la golfo ol al la intereso al la lingvo mem...

Francis

Farendaĵoj notindaj en via kalendaro 2018-2019

La klubo de Vannes invitas vin spekti sian teatraĵon 2019

Ne maltrafu la daton :

La 3-an de februaro



**Bonvenon en la kulturdomo
Kastelo Gresillon**

VENU POR AUTUNE 2018

De la 27a de oktobro ĝis la 4a de novembro

KIO OKAZOS EN 2019

9-a Printempas

26a de aprilo – 4a de majo

preparado al KER-ekzamenoj, ekzamenoj

Someraj Semajnoj :

8a – 15a de julio 5-a [Interŝanĝoj](#) de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso (provizore)

8a – 18a de julio Maratona Esperanto-kurso dum 10 tagoj (provizore)

6a – 16a de aŭgusto Festa Semajno + danco-semajno (provizore)



17-a NovJara Renkontiĝo

27-a de decembro ĝis la 3-a de januaro
en Wiesbaden Germanio

Junulara Esperanto Semajno


26-a de decembro ĝis la 4-a de januaro
En Storkow apud Berlino

71a IFEF kongreso (fervojistoj) 3-9an de majo ,
kune kun la Hispana kaj la Andaluza Kongreso
en Málaga (Hispanio)

Informoj ĉe <http://esperanto-andalucia.info/>

La 104-a Universala Kongreso de Esperanto

Lahtio en Finnlando



20-27an de julio 2019

Por kompleta E-ista kalendaro vizitu
la retpaĝon

<http://www.eventoj.hu/2014.htm>